

KATALUNA ESPERANTISTO

MONATA GAZETO □ OFICIALA ORGANO DE LA KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO
SEN PAGA POR LA GEFEDERACIANOJ

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO
12. strato Gracia. — SABADELL
BARCELONO-HISPANUJO

AVIZO: La Redakcio konservas al si la rajton korekti laŭ bezone la manuskriptojn. Neakceptitajn manuskriptojn oni ne resendas.

— NIA DEVIZO : « MARO ESTAS GUTARO » —

ENHAVO: *Resumo*, La Redakcio de K. E. — *En honor d'en Seydà*, Varios. *Examens*, K. E. — *Penso*, Kuriozaĵo, Spritaĵo, Angel Novejarque. — *Humorajoj*, P. A. A. — *Funebra parolado*, Horace M. Stephens. — *Mi scias kanton...*, Joseph Ventura. — *Letra als senyors Redactors del «Kataluna Esperantisto»*, Fred. Pujulà. — *Oficiala Parto*, K. E. F. — *Enlanda Movado*, Delfi Dalmau kaj K. E. — *Bibliografio*, K. E.

RESUMO

Du jaroj pasis de post kiam, ni aperis por la unua fojo, kaj eĉ riskante ŝajni malmodestaj ni konfesas, ke ni ne estas malkontentaj por nia laboro. Paŝo post paŝo, laŭ la ritmo proponita de nia majstro, ni antaŭeniris tra la vojo de la malfacilaĵoj ofte kun ĉagreno en la koro, tamen neniam perdante la konvinkon pri la fina venko, neniam flankiĝante por ripozi. Ĝi ne estas persona merito nia; ĝi estas simpla rezultaĵo de la ĉies kunhelpejo, de la ĉies volo, de la ĉies entuziasmo por nia morala unuiĝo.

Ĉar en nia lando oni ne tre bone komprenas la ekziston de estaĵoj, kiuj ne sin montras per korpa materia formo, la ideo de Federacio devis insiste bati kiel bormaŝino por eniĝi en la rokon de la malmoliĝinta kutimo. Sed la tunelo nun estas borita kaj senriska larĝa vojo permesas nun la pason de vivfluo de nia reala lando al la lando de la idealo. Ni memoras, ke antaŭ kelkaj jaroj, kiam nia Deputitaro kreis la Katalunan Universitaton, la ĵurnalistoj senditaj de Madrido por fari enketon rapidis telegrafi pri la neekzisto de tia Universitato. Ili trakuris la centrajn kaj eksterajn kvartalojn de Barcelono kaj

nenie al ili sin montris la majesta fiera konstruaĵo. Oni tre longe ŝercis pri la kataluna parademo. Tamen en Ateneo, en tiu aŭ alia pli-malpli grava societejo, en la Palaco de la Deputitaro mem, eminentaj profesoroj klarigadis la teoriojn laŭ plano tre metode antaŭdifinita. Oni ne komprenis tiam, ke Universitato ne estas arkitektura aranĝo de kuncementitaj ŝtonoj sed metoda organizado de intelektaj fortoj celanta pliperfektigon de la individuaj fakultoj kaj de la sociaj entreprenoj. Tiel la ekzisto de nia Federacio estis same neita kaj nur iom post iom oni komprenadis ke ĝi ne estas apartemento kun gardisto kaj tabloj por trinki kafon, nek flago kun aparta signo, nek marko pli-malpli bele desegnita; oni komprenadis ke ĝi ne nepre devas loĝi en certa nek en la ĉefa urbo, kaj oni bone sentadis, ke Federacio, estas la metoda, logika, natura organizado de niaj esperantistaj fortoj celanta pli grandan fratecon de niaj samlandanoj, pli facilajn internaciajn rilatojn kun alilandaj Asocioj kaj pli rapidan atingon de nia komuna venko. Kelkajn jarojn ni bezonis por la plena disvastigo de tiu kompreno, kaj estas por ni ĝojo povi konstatigi ĝin je la fino de la dua jaro post nia apero.

Por lanĉi ŝipon necese estas kunigi samtempe la fortojn de ĉiu maristo. Se dum unu tiras ŝnuron la alia trenas lignaĵon kaj la alia ŝultropuŝas maston, la ŝipo restos longatempe en sulko de l' sablejo klinita sur la flanko, dum la bonfara vento moke frizos kaj tremetigos la surfacon de la maro flugante malproksimen. Sed nur ili tiru kune per sama samtempa movo kaj tuj la ŝipo fendos la fluidaĵon kaj transportos la vivon kaj riĉaĵojn tra la mondo. Oni tion komprenis, kaj oni komprenis ankaŭ, ke se unu sola voĉo devas fari la inviton al la movo, tiu movo nur estos ritma, unueca, taŭga kaj profita se la akompana kanto eliĝas el la buŝo de ĉiuj ŝipanoj. Tial venis siatempe la decido de nia II^a Kongreso kreante la Konsultan Komision de Prezidantoj de Grupoj aliĝintaj al nia Asocio. Tial venos iom post iom novaj perfektaĵoj, kaj tiel nia forto povos esti utile profitita en la internacia movo iniciita en la V^a Internacia Kongreso de Barcelono kaj plene organizota en Antverpeno.

Ni ne ŝparu ian ajn oferon de nia individueco por ke la veloj de nia ŝipo ŝvelu per la favora vento kaj niaj riĉaĵoj de espero disvastiĝu tra la tuta mondo.

* * *

Esperu ni, ke la proksima jaro kiel la nuna tiel estos fruktoporta por nia afero, sed ke ne tiel multekoste ĝi pagigos la alportotajn feliĉojn. Esperu ni, ke niaj vicoj ne konstatos ankoraŭ kun doloro la mankon de fervoraj batalantoj! La morto pioĉis sur la kampon de

l' juneco. Al fraŭlino Bacardi, fratino de nia kara samnoma amiko, sekvis pastro Muixí, sekvis Domenech Serdà.

Ni ilin memoru kaj ilin honoru laboradante por nia sankta afero. Ni ĉerpu el nia ĉagreno novajn fortojn, por alkonduki al la venko la lingvon, kiun ankaŭ ili parolis!

* * *

Nia revuo, kiu estas la voĉportilo de niaj komunaj deziroj, la diskonigilo de la agado de niaj aliurbaj samideanoj, la alproksimigilo de niaj individuaj sentoj; nia komuna laborado, kiu pliefikigos per metodo kaj kunigo de fortoj la propagandadon de nia afero; niaj apartaj organizaĵoj, kiel la Havena Komisiono, kiu semos senhalte apud la fremdulojn; nia ĉiujara Literatura Konkurso, kiu incitos pli kaj pli al la ellernado de nia lingvo kaj kiu donos al ni perfektajn tradukojn de la naciaj verkoj kaj riĉigos per originaloj nian floro-plenan literaturon; la harmonio inter ni kun la konvinko per la fakto, ke ĉe la pordo de la kastelo, kiun ni defendas, ni devas lasi la armilojn per kiuj ni nin vundas reciproke en la socia vivo; ĉiuj tiuj aferoj nur estis atingebla de Federacio; neniam izolitaj en grupoj sen rilato inter ili ni estus atingintaj tiajn bonojn. Sed, eĉ kiam Federacio ne devus alporti ilin al ni, sufiĉus, por ke ni restu ĝiaj fervoraj defendantoj pensi pri la Kongreso, kiu kunigante nin ĉiujn unu fojon ĉiujare en la urboj katalunaj ebligos al ni fari grandan manifestacion de nia povo kaj altiri al ni tutan urbon, kiel okazis en Sabadell unue, poste en Tarragona kaj okazos kun pli da efiko en la Kongresurbo de la nuna jaro.

Nur per Federacio tio estis ebla. Sed Federacio ne estas abstraktaĵo; ĝi estas realaĵo; ĝi estas ĉiuj ni. Ĝia forto dependas de nia forto. Ju pli ĝi estos potenca, des pli ni valoros en la socia movado de nia lando; sed page al tiu plivalorigo ni devas doni nian personan laboron. Nia III^a Kongreso estos la multiplikita rezultaĵo de niaj penoj, sed ni devas alporti almenaŭ niajn penojn mem. Unu izolita guto povas eĉ havi la ŝajnon de riĉa stono; milionoj da izolitaj gutoj malaperos kun ilia beleco ĉe la varmo de la unuaj sunradioj tute same, kiel unu sola; sed milionoj da gutoj *grupiĝintaj* estos samtempe forto. movo, vivo kaj beleco: «maro estas gitaro».

Ni laboru, karaj kunfederacianoj; ni preparu kaj sendu jam de nun la diskutotajn projektojn por plibonigi nian organizaĵon; ni antaŭdiskutu jam ilin en la apartaj grupoj por inciti la fajron de niaj amoj; ni ne atendu la lastajn momentojn por verki la versaĵojn kaj prozaĵojn, kiuj aspiras al la premioj por originalaj verkoj de nia Literatura Konkurso; ni pretiĝu korekte traduki la tekstojn, kiujn

baldaŭ diskonigos la juĝantaro de la Konkurso, kaj la grupoj riĉaj kaj la fervoraj samideanoj, kiuj jam la lasta jaro proponis apartajn premiojn, proponu ilin de nun ne atendante la lastajn momentojn kaj permesante al la verkistoj pli seriozan laboradon, kaj al ni mem pli ĝeneralan inviton.

Ni ĉiuj estas la Federacio. Ni ne forgesu nin mem.

* * *

Ni tre dankas sinjoron R. Whitaker pro la afabla letero, kiun li sendis al ni okaze de la raporto de KATALUNA ESPERANTISTO pri la Kongreso de Tarragono.

* * *

Ni dankas la redakcion de *La Propagandisto* pro tio, ke ĝi bonvolis reprodukti nian raporton pri la laboroj de la Havena Komisiono. Certe ĝia disvastigado kontribuos al la rapida starigo de tiu organizaĵo, de kiu ni tiom multe esperas.

* * *

Kiam oni skribis per anseraj plumoj, oni povis postuli de literaturistoj konon pri ĉiu publicita verko; sed nun, kiam oni ne nur skribas per skribmaŝino, sed per maŝinoj oni kompostas, presas, bindas kaj eĉ disvendas, kaj la nombron de ĉiutage aperantaj verkoj oni kalkulas po miloj, estas tute neeble eĉ scii la titolojn de unu kvarono de libroj aperintaj en unu sola lando. Ni devas atendi por havi ĝeneralan konon pri tio, la elpenson de oportunaj legmaŝino kaj memormaŝino.

Ni diras tion, ĉar ni ricevis leteron per kiu kara kunfederaciano nia rimarkigas nin, ke la artikolo *Ĉiela peco* aperinta en K. E. (paĝo 323^a) similas, kiel ovo ovon, la versaĵon *Dins sa cambra*, de nia fama poeto Maragall, aperinta en la verko *Les Disperses* (paĝo 7^a, Biblioteko *Juventut*), kaj nia korespondinto iom kulpigas nin pri tiu malatento.

Efektive, krom tio, ke *Ĉiela peco* estas proze verkita, ĝi estas preskaŭ laŭvorta traduko de la bela juneca verspeco de l' aŭtoro de *La Vaca Cega*, kiun niaj alilandaj legantoj konas per la majstra traduko de nia samideano Sro. Inglada. Ni respondas pri la beleco de la temo, sed, ĉu ni povas respondi pri la delikateco de ĉiuj? Cetere, la verkaĵojn subskribitajn de samideanoj, kiujn ni konas, ni publicas lasante al ili la respondecon pri la originaleco; kaj ni estas certaj, ke en la nuna okazo, nur estas simpla forgeso de la tradukinto citi la veran aŭtoron.

Ni profitas la okazon por peti niajn afablajn kunlaborantojn ne fali en tiajn forgesojn.

* * *

Akceptinte la deziron de la Komitato de «K. E. F.» kiu en kunsido de la 6^a Aŭgusto decidis proponi al Sro. Fred. Pujulà la direktan lokon de KATALUNA ESPERANTISTO, nia kara amiko zorgos oficiale de post la venonta numero pri la redaktado de nia revuo.

LA REDAKCIO DE K. E.



EN HONOR D'EN SERDÀ

EL dia 29 de Juny tinguarem la dissort de perdre per a sempre més el nostre fervorós amic, i propagador esperantista, Domech Serdà Simó. A l'amic que amb fe creixent esmerçà tots els seus entusiasmes per a l'avenç i divulgació de la llengua internacional; a l'apostol que inicià i, mercès a la seva activitat, portà a terme la constitució i organització de la cada dia més floreixent «Federació Catalana d'Esperantistes»; es precis onorar-lo amb quelcom que perpetui la seva memoria i sigui a l'ensems una prova de la seva activitat.

Per a realitzar-ho, els seus nombrosos amics han pensat en recollir curosament els treballs ineditats que deixà (ja traduccions, ja originals) per a fer-ne un llibre que, si l'autor visqués, seria per a ell un repic de gloria, i que avui nosaltres llegirem i guardarem com un piados record i un merescut omenatge.

Cridem, doncs, a tots els que desitgin contribuir-hi amb l'adquisició del llibre, per a que se serveixin donar-ne coneixement, per postal, a l'administrador de «K. E. F.», a fi de començar els treballs necessaris, puix s'ha d'entendre que dit llibre no serà posat a la venda pública, sinó que solament serà per als senyors que per endavant l'agin encarregat.

Dels detalls de preu, format, sumari, i demés ne donarem compte en números successius: avui solament podem dir que 'l recull serà fet amb tota cura, encarregant-sen un dels nostres millors literats; i també que anirà avalat amb la firma de prestigiosos esperantistes.

No dubtem que la nostra intenció serà ben compresa, i que tot-om procurarà portar el seu obol ad aquesta obra, per a que així l'omenatge sigui de tots,

J. Amades, J. Bremón Masgrau, D. Dalmau, A. Martí, S. Mas, E. Pellicer, J. Piferrer, J. Planas Sadurní, pbr., S. Puigbonet, F. Pujulà, J. Rosals, P. Ustrell.



EXAMENS

S'HA rebut en la secretaria de la Federació la petició de varis esperantistes, qui atenentse al Reglament aprovat en el 2.^{on} Congrés de Tarragona, desitjen examinarse pera adquirir el titol de professor de Esperanto. Com que 'l tribunal d'examens, constituït pels senyors Bremón, Pujulà y Rosals, no podrà reunir-se fins que 'ls candidats sien al menys en nombre de 10, ho fem avinent a tots els qui 'l passat istiu volien examinarse, pera que s'apressin a fer la petició y contribueixin a la prompta organització del nostre professorat, qui ha de començar nous cursos per Janer, y fer factible la aplicació de la darrera Real ordre, concernent al Esperanto, en els establiments oficials d'ensenyança.

Véginse les decisions del Congrés de Tarragona referentes a les condicions de matricula. S'adressin les peticions, a la Secretaria de la K. E. F. — Sabadell, Carrer Gracia, 12.

Els senyors qui professaren cursos l'any passat son pregats d'aconcèllar a llurs exdeixebles l'adquisició del diploma de *lernado* donan los les instruccions necessaries pera 'l mellor exit de llurs examens. Sembla que 's tracta d'instituir premis otorgats per concurs entre 'ls deixebles qui hagin obtingut aquest diploma.

K. E.

PENSO

el Trueba

«La floro el la fruktarboj estas tre feliĉa patrino, ĉar ĝi ne mortas, ĝis kiam siaj *idoj* ne estas grandetaj.»

KURIOZAĴO

Triono de la mondanoj parolas la ĥinan lingvon.

SPRITAĴO

FILOSOFIA OPINIO

Oni parolas pri la edziĝeco kaj unu el la interparolantoj estas demandita pri la kialo de lia needziĝemo.

Li respondas:

— Ĉar se la virino, kiu kun mi devos kunvivi estas bona, mi devas ŝin peti; se ŝi estas malbona, ŝin suferi; se ŝi estas malriĉa, ŝin nutradi; se ŝi estas riĉa, ŝin toleri; se ŝi estas malbela, ŝin malami, kaj se ŝi estas bela, ŝin atentgardi.

ANGEL NOVEJARQUE, el Valencio

HUMORAĴOJ

— Diru al mi, kion signifas tiu ĉi enskriko : « English spoken here » kiun oni legas sur tiu ĉi vitra meblo.

— Tio ĉi signifas : Tie ĉi oni parolas angle.

— Ni ne eniru do, ĉar neniu el ni scias paroli tiun lingvon.

* * *

Antaŭ la juĝistaro en la 2^a de Januaro :

La prezidanto : — Kiel, ĉu alia foje ĉi tie ?

La procesito : — Sinjoro prezidanto : mi ne volis preterlasi la okazon gratuli vin pro la nova jaro.

* * *

Oni parolas ĉe la pordistino pri la juna deksesjara Zizi. Ĉiu esprimas sian opinion pri ŝia karaktero.

— Mi konas bone fraŭlinon Zizi, — diras la loĝanto de la unua etaĝo. — Ŝi ĉiam parolas, ne lasante paroli la aliajn. Ŝia emo estas klarega. Estas necese okupi ŝin ĉe la telefonoficejo.

* * *

Johano, kiu aspiras la gloron, vivadas melankolie.

— Kuraĝo ! unu el liaj amikoj diras al li ; daŭrigu la aĝadon... vi atingos esti glora homo

Jen la respondo de Johano al sia amiko :

— Glora homo ! Pro mia malbona sorto, se mi atingus la gloron, neniu scius ĝin !

* * *

Milionulo pekema, kiu estas mortante, demandas la pastron, kiu estas apud li :

— Ĉu vi opinias ke se mi donacus al la preĝejo 30,000 durojn mi resaniĝus ?

La pastro respondis al li :

— Mi ne certigas al vi tion ; tamen, estus bona se vi provos.

* * *

Ĉe la restoracio :

— Kia malrapideco kelnero ! Kial vi ne portis al mi ankoraŭ la supon ?

— Pripensu, sinjoro, ke vi petis al mi supon el testudo !

* * *

Inter amikoj :

— Ĉu ne plaĉas al vi la amikeco ?

— Ne.

— Kial ?

— Ĉar amikeco estas kiel pluvombreloj, kiuj turniĝas kiam la ventego plifortiĝas.

P. A. A.

FUNEBRA PAROLADO

el R. G. INGERSOLL

MI scias ke estas vante orumi malĝojon : per vortoj, tamen mi deziras forpreni de ĉiu tomo ĝian timon. Tie ĉi en la mondo, kie vivo kaj morto estas egale reĝoj, ĉiuj devas brave renkonti tion, kion ĉiuj estas rekontintaj. La estonto estas plenigita de timo makulita kaj malpurigita de la senkora pasinto. De la nura arbo de vivo, la burĝonoj kaj floroj falas kun la matura frukto kaj en la komuna lito de tero, patriarkoj kaj infanoj dormas flankon ĉe flanko. Kial ni devus timi tion, kio venos al ĉiuj, kiuj ekzistas? Ni ne povas ĝin diri. Ni ne scias, kiu estas pligranda beno, ĉu vivo ĉu morto. Ni ne povas diri, ke morto ne estas bona. Ni ne scias ĉu la tomo estas la fino de tiu ĉi vivo, aŭ la pordo de alia. aŭ ĉu la nokto tie ĉi ne estas la tagiĝo. Nek povas ni diri, kiu estas pli favorata, la infaneto mortanta en brakoj de ĝia patrino antaŭ ol ĝiaj lipoj lernis paroli vorton, aŭ tiu, kiu vojaĝas la tutan longon de la malglata vojo de la vivo, farante dolore la lastajn malrapidajn paŝojn per apogilo kaj lambastono. Ĉiu lulilo pridemandas nin «El kie?», kaj ĉiu ĉerko «al kie»? La senklara sovaĝulo ploranta super sia mortinto povas respondi al la demando tiel inteligente kaj kontente, kiel la ravita oferisto de la plej aŭtentika kredo. La larmlena senklareco de unu estas ĝuste tiel konsola, kiel la kleraj nesencaj vortoj de la alia.

Neniu staranto, kie la horizonto de vivo tuŝas tombon, havas ian rajton profeti pri estonteco plenigita je doloro kaj larnoj. Eble morto donas ĉion, kio estas valora en vivo. Se tiuj, kiuj enbrakigas nin, koron ĉe koro, neniam povus morti, estas eble ke amo forlasus la terglobon. Estas eble ke komuna kredo forigus el niaj vojetoj la malbonajn kreskaĵojn de memamo, kaj mi preferus vivi kaj ami, kie morto estas reĝo, ol havi eternan vivon, kie amo ne estas. Alia vivo estus nenio, se ni ne konas kaj amas denove tiujn, kiuj amas nin tie ĉi. Ili staras ĉirkaŭ tiu ĉi tomo kun rompantaj koroj, havas nenion por timi. La pligranda kaj plinobela kredo pri ĉio, kio estas kaj estos diras al ni, ke morto ne povas esti io pli malbona ol perfekta ripozo. Ni scias ke pro la komunaj deziroj de vivo, la bezonoj kaj devoj de ĉiu horo, ilia malĝojo malpliĝos tagon post tago ĝis fine tiu ĉi tomo estos por ili loko de ripozo kaj paco, preskaŭ de ĝojo. Por ili estas tiu ĉi konsolo! la mortintoj ne suferas. Se ili vivas denove ilia vivado certe estos tiel bona kiel la nia. Ni havas nenian timon; ne estas ĉiuj infanoj de la sama patrino, kaj la sama sorto atendas nin ĉiujn. Ni ankaŭ havas nian religion, kaj ĝi estas helpo por la vivantoj, espero por la mortintoj.»

El angla originalo tradukis,
HORACE M. STEPHENS



MI SCIAS KANTON...

Mi scias kanton tiel dolĉan sed por mi tiel malgajan kaj tamen belan, ke, mi ŝatas ĝin rememori dum mia kvietsoleco. Ĝi estas ama kanto. Ĝiaj vortoj havas mi ne scias kion plendan. kio volas transcendi gaje inter la sonoj. Kaj tiu gajeco sendecida kaj nedefinita kiun ili disigas, vibradas lume inter ĉagrena larmo kaj mizerplendo...

Mi estas ĝin sciinta de sesjara knabino, kiu ĝin kantadis tra la neĝaj stratoj, ĉe la sojlo de l' kafejoj. El tiu dolĉa buŝo elfluadis senkomprenaj vortoj kun la sama malforteco kaj pleneco kiel tiuj de la neĝeroj. Ili elfluadis iafoje nefinitaj, kvazaŭ la spirito de la knabino ilin ŝirus pro malĝojo, kvazaŭ, vortoj ne apartenantaj al ŝi, ribeliĝus pro eliro el lipoj kiuj ilin ne komprenis... Kaj tiu kanto, mi preskaŭ ĝin ne komprenante kiel ŝi, iafoje liveras al mi melankolian ensorĉon; fiksigas mian rigardon, nenion vidante, kvazaŭ miaj okuloj estus hipnotizitaj de aliaj nevideblaj...

Estas la okuloj apenaŭ malfermitaj de la etulino, de la dolĉa knabino, kiu malplektadis ĉirkaŭ si, aron da ignoritaj melodioj... Kaj tra tiuj naivaj okuloj, okuloj de feino revivigita, kiuj estas nenio el la mirinda ensorĉo de la songo... vivadas kaj transcendas nur la imago de la vivo vaganta, de la vivo nekontentigita, de la deziroj forprenitaj, de la vivo de la dolĉaj malkvietecoj kaj de la mizeroj vagabondaj...

Tra tiu rigardo, pasadas la grizaj, vintraj tagoj, similaj al grizeco de ĉefvojo, de toambo, de bulvarado..., la neĝaj tagoj, de la neĝo rajdanta sur la tegmentoj kaptantaj la brulaĵon el la fajrujoj.

Mi scias kanton, kiu estas ama... kiu estis lerniginta al tiu etulino ĉi tiujn sonojn de deziro, kiuj ne povas vibrigi ŝian animon? Kaj tra la frostaj noktoj, noktoj palaj kaj akraj de la lunhelecoj bonanimaj, kiuj elĝemas sur la neĝo de l' izolitaj stratoj, de kia amstelo kaj de kia amo ŝi transcendas?

Venu, venu kun viaj sesjaraj mondvagadoj kaj kun via griza kanto... Venu, ĉar la amojn, kiuj ne apartenas al ni, ni kantos... kaj mi cin akompanos tra la neĝaj stratoj, sekvante ciajn paŝojn kaj kun fiksitaj okuloj rigardantaj nenien, ni elvokos ĉiujn aĵojn je l' kredo de rigardo... kaj ni kantos la kanton kaj ridos en la mizeroj, serĉante tra la mondo amon nekonatan, kiu restos super niaj lipoj por ĝin ni atingi dum la horoj de kvieto kaj soleco.

JOSEPH VENTURA



LLETRA ALS SENYORS REDACTORS DEL «KATALUNA ESPERANTISTO»

VOSTES me pregunten que 'ls faci dos mots pera 'l numero de Desembre ab motiu d'haver acceptat el carrech de Director de la Revista que 'ls senyors de la Junta del K. E. F. me conferiren.

Jo entenia dir aquests mots en el numero de Janer y crèguintme que si ab plaer els complasch satisfent el seu prech, ab sentiment me privo, avençantlo, d'assumpto, de material, del qual tant escasos anèm pera compaginar un numero.

No se m'escapa, que 'l carrech ab que m'han crucificat els bons amichs del Comitè es d'aquells qui porten menos goigs que maldecaps. Conech l'humor dels anonims autors d'articles inpublicables y la prohija literaria que dona l'estrella de cinch puntes. Prohija literaria y per afegiment poètica. Apendre les 16 regles y sentirse poeta es tot hù. Jo mateix, qui may he fet versos, lo primer que vaig fer en Esperanto fou una poesia. Y quina *poesia*! No m'en avergonyeixo no obstant. Tot bon esperantista passa pels mateixos graus de febre. Pero com la propria experiència me demostra, que si jo hagués enviat la *pooesia* a una revista y 'l director me l'hagués publicada, ara jo rellegintla li guardaria una rencunia profunda, y vull evitar que me la guardin semblant a mi, penso no publicar cap vers qui no vagi firmat per l'autor d'almenys tres articles en prosa ja publicats qualque part.

Com a reformes materials, publicarem la revista en paper de més cos, més escayent al desenrotllo que va prenent la Federació. Potser n'aumentarem el nombre de pàgines : això dependrà del major nombre de federats; de la riquesa de la Federació ne dependrà la del periodich.

Com a reforma moral, hi ha la promesa d'alguns dels nostres més distingits *pionirs* de colaborarhi assiduament. Jo espero que cap d'ells restarà sòrt al nostre prech y que tots compendran que 'l nostre bon nom al extranger depend de la qualitat dels treballs que 's publiquin en la nostra revista.

Penso publicar la historia del Esperanto a Catalunya, redactada pels mellors esperantistes de cada vila; les efemerides del moviment català; el mapa esperantista de nostra terra; el planol de Barcelona, ab indicació de totes les cases ahont hi ha un *samideano*, y 'ls d'altres viles si cal; polemiques sobre qüestions gramaticals esperanto-catalanes; una amplia informació del moviment català, *tot en Esperanto*;

y tractant de tant en tant lleugerament algun qu'altre aveniment del nostre moviment y de la nostra vida pera cercar l'amenitat necessaria en tota tasca llorda, com la de la propaganda d'una idea desinteressada en un poble massa interessat.

Pero tot això no passarà de proposits y de bones intencions sense l'ajuda de tots. Ab tots els companys compto y espero.

Pera termenar, jò entench que la revista es dels federats, y per lo tant, ab el més ample esperit de tolerancia en ella, s'hi acullirà la veu dels nostres companys, expressada en bon esperanto, y respectuosa pera les persones y pera la declaració Fundamentista de Boulogne.

Aceptin, estimats senyors y companys, ma afectuosa salutació.

FRED. PUJULÁ



OFICIALA PARTO

El Comitè de «K. E. F.» recomana als senyors delegats i particulars que encara no tinguin llurs comptes saldats amb l'Administració que tinguin a bé fer-ho abans del 25 del corrent; puix, avent-se de presentar en el prop-vinent número de janer l'estat de caixa de 1911, forçosament auriem d'apareixer dits senyors com a deutors, amb llurs respectius noms.

Novament recordem que poden enviar l'import de quotes i demés en sagells de correu de 15 centims ad aquesta Administració (Gracia, 23; Sabadell).

De l'administrador als delegats. — Durant els primers dies de Janer de 1912 rebran les *membrokartoj* pera al nou any. Se 'ls prega que les cobrin desseguida, o que almenys 'ls interessats hi donin llur conformitat, puix després succeeix que al cap de mesos hi ha qui desitja no continuar a les nostres files quan ja s'han fet envius de revista i altres despeses. Per lo tant, abans d'acabar el Janer, enviin tots els detalls possible a l'Administració, com són baixes de soci, nous socis entrants i tot allò que pugui fer referencia a la bona marxa de l'Administració. S'adverteix que tot federat del qual no s' rebi dintre 'l mes de Febrer la corresponent nota de continuació, ja sigui que agi adquirit la corrésponent *membrokarto*, ja que agi donat la seva conformitat, deixarà de rebre K. E.

De la Direcció de K. E. als delegats. — La Direcció prega als senyors delegats que abans del 15 de cada mes tinguin la bondat d'enviar la nota corresponent al moviment de la llur localitat, a fi i efecte que la secció d'«Enlanda Movado» surti lo més completa possible.

Els originals han de remetre-s franquejats amb sagells de quart de centim, posant en el sobre : «Originals per a impremta»; i no, com alguns fan, enviant-los com a cartes.

Del Comitè de «K. E. F.» als senyors presidents i secretaris dels grups o societats aderits. — El Comitè de «K. E. F.» 'ls prega que envien els noms i adresses dels actuals presidents i secretaris; com també, si saben l'existència d'algun grupo o societat no aderida que tinguin a bé comunicar-ho, a fi de poder fer els treballs amb rapidesa, quan sigui necessari, i tenir un registre ben format.

No passa mes sense que l'Administració tingui queixes de subscriptors que diuen no aver rebut el número corresponent de K. E., arribant alguns a suposar que no se 'ls envia; per lo qual el senyor administrador (boi fent constar que, sense excepció, són expedits tots els exemplars) recomana a tot-om que deixi de rebre algun número que de primer el reclami al corresponent repartidor de correspondència, i, en el cas que no l'hi donin, alesores envii una postal a la nostra Administració per a que pugui posar-hi remei.

Els que escriuen al Comitè o a l'administrador i no reben contesta particularment, no creguin que es que no se 'ls té l'atenció deguda; ans al contrari: o que 'y ha es que, degut a l'excés de treball que cau damunt nostre, no es possible fer-ho. Ademés, d'avui endavant, trobaran a la secció *Korespondado*, de K. E., la corresponent resposta, sempre i quan l'assumpte no urgeixi, per lo qual recomanem una mica de paciència.

També hem de recomanar, que s'escrigui, sempre en postal, a fi d'evitar despeses.



ENLANDA MOVADO

BARCELONO

Nova Societo. — En la kvartalo Barceloneta estis fondata de niaj tieaj fervoraj gesamideanoj nova Societo monata «Geesperantistaro».

La 3^{an} Oktobro okazis la inaŭguracio, kiu konsistis en propaganda publika parolado de Sro. Delfi Dalmau.

Lertaj gesamideanoj en «Geesperantistaro» nun instruas Esperanton. Ĉiuj kursoj estas tre ĉeestataj. Ĉiam antaŭen!

Parolado. — La 12^{an} Oktobro, ĉe la grava Barcelona Societo «Dependencia Mercantil», Sro. Delfi Dalmau faris propagandan paroladon per kiu li klarigis

kial Esperanto estas la plej facillernebla lingvo, kaj tia same per ĉiuj homoj. Li ankaŭ komparis la vivon de nacia lingvo kun tiu de Esperanto; kaj fine li klarigis kial la latina lingvo logike malsukcesis kaj kial Esperanto nepre sukcesos.

Nia samideano estis aplaŭdata de la tuta ĉeestantaro en kiu tamen estis preskaŭ neniuj esperantistoj.

Novaj kursoj. — Ankoraŭ dum la lastantaŭa monato la Barcelonaj ĵurnaloj enhavis sciigojn pri novaj kursoj de Esperanto farigitaj de la grupoj «Semo», «Espero Kataluna», «Supren», Barcelona Stelo», k. a., «Esperanto kaj Patrujo» farigis ankaŭ novajn kursojn kun la plia propagando de inaŭguracio, kiu konsistis en publika parolado de Sro. J. B. Albiñana.

Reveno. — En la lastpasinta monato revenis nia agema pioniro Sr. Frederich Pujulá.

Estu li plej feliĉe bonreveninta kaj lia restado en Katalunujo plej longa. Tion petegas la Kataluna gesamideanaro kaj tion postulas nia sankta afero en nia lando.

* * *

Així quan quelcom dubtós de vida llarga, presenta aspectes de força vital, diem que són les revifalles de sa mort, podem avui dir que 'l moviment esperantista barceloní es troba ara en l'esmortuïment-sintoma d'una definitiva revivificació, d'un resurgiment esplendorós, sintoma, en fi, d'una reorganització forta, base d'una solida actuació avassalladora, definitivament vencedora.

Els cursos que 'ls nostrés grupus obren avui, són migrats; els mateixos grupus es desmembren, s'enfebleixen i fins alguns moren. Els *samideanoj* més abnegats i forts, es veuen impotents per a lluitar en tal estat. I es precisament i unicament això lo que farà sentir a tots, prou intensament, la conveniència i necessitat de l'unió i de la organització. Si cada un dels elements de nostre moviment barceloní se sentís fort, això es, apte o en estat propici per a obrar y lluitar tot sol, poc sentiria la necessitat de l'unió: es, doncs, un enfebliment general, un esmortuïment ben general lo qu'ha de fer possible l'aplegament i unió de tots els elements abnegats i valiosos.

Per això creiem que l'actual estat de nostre moviment a Barcelona es un ermós sintoma.

I quan per aquest camí aurem arrivat a l'unió i organització, cada un tornarà a sentir-se fort, però com que alesores ja serà tot-om dintre l'unió, i tant sols dintre l'unió se sentirà tot-om fort, com més fort sigui cada ú, tant més forts seran tots plegats. — *Delfi Dalmau.*

SABADELL

En la tago 5^{na} de Novembro okazis en la «Teatre Principal» tre grava esperanta festo, organizita de la societo «Aplech Esperanta Grupo».

Ĝi estis prezidita de Sro. A. Sabadell, partoprenante Sroj. Ll. Mas, de «Katolika Stelo»; M. Sola kaj A. Oliart, de «Lumon» kaj R. Graupere, prezidanto de la ĵus naskita grupo de la societo «C. de D. del C. y la I.» el Sabadell.

Ankaŭ partoprenis Finoj. P. Bertrand, J. Figuerola, E. Elias, E. Durán, M. Plana, T. Torra kaj C. Llubet, kiu ludis tre lerte muzikajojn el Mendelshon, Wagner kaj nian himnon.

LLEIDA

Esperantista grupo «Ilerda Espero». Tia estas la nomo de nova kunbatalanto por nia celo, ĵus fondiĝinta ĉe Ilerdo (Lleida) dank'al la kuraĝa propagando de la infanteria kapitano Sro. Johano Melons, kiu varbis al nia celo tridekon da gelernantoj, kiuj ceestas la kursojn de Esperanto donatajn ciutage de la 7^a ĝis la 8^a vespere, de Sroj. Melons kaj Grau Casas.

La entuziasmo de la novaj samcelanoj promesas kaj antaŭvidigas fruktoportan rezultaton kaj estas plej agrable konstati la fondiĝon de tiu ĉi societo, tial ke en la aludita cefurbo ekzistis ankoraŭ nenia esperantista kunveno, kvankam en du privataj lernejoj la infanoj estis, de kelka tempo, instruataj pri Esperanto.

Por altiri ĉies atenton sur nian lingvon oni preparas esperantajn festojn, kiuj sendube atingos grandan sukceson, kaj serio da poresperantaj artikoloj estos baldaŭ publikigata ĉe la lokaj ĵurnaloj.

Kuraĝe antaŭen, ilerdataj samideanoj!



BIBLIOGRAFIO

Ni nur raportos pri verkoj duope senditaj al la Redakcio.

Dresden kaj la Esperantistaro. Gvidlibro kaj propagandilo kun ilustraĵoj. Friedrich Ader, Esperanto-Verlag. Dresden, A. 1, Hansahaus (Zahusgasse, 12). Prezo : 2 respondkuponoj.

Jen bonega libro por konvinkigi niajn kontraŭulojn, kiuj bezonas vidi agojn por fermi la buŝon kaj klini la kapon antaŭ nia afero. Ĝi estas bele prezentita, kaj ne devas manki en la biblioteko de niaj samideanoj.

Disrompu ni la intermurojn, respondo de Teosofiano al parolado farita de Dro. A. H. de Hartog en la Wauhana Logio de la Theosofia Societo, kun kontraŭparolado de Dro. A. H. de Hartog, holanda pastro protestanta. Eldonita de P. Dz. Neen, Amersfoort. Nederlando. Oni ĝin ricevos kontraŭ la sendo de poŝtmandato da 0'20 sm.

La krimoj de Dio, de Sébastien Faure, tradukis Luis Carlos kaj F. Boukin. Kolekto «Paco - Libereco». Prezo : 25 centimoj afrankite.

Esperanto kaj Ido, n° 4 de la 10-spesdeka Biblioteko Esperantista; laŭ G. Gautherot, tradukis L. E. Meier. Eldonita de «Esperanto-Propaganda Instituto. Kaiser - Wilhem - sts. 15. Leipzig». 16 paĝoj. Prezo : sm. 0'100.

Grava estas la verko de Gautherot *La Question de la Langue Internationale* kaj bona la traduko, kiun faris nia samideano Meier de tiu ĉi verko, kiu estas la plej bona kaj efika propagandilo franclingva. La broŝureto profite legos ĉiuj, kiuj deziras senpartian informigon pri la Idisto skismo.

Vidaĵoj de Senlimo. Originala traktato de Prof. Marcel Finot, n° 5 el la sama Biblioteko. 24 paĝoj. Prezo : kiel la antaŭa.

Prof. Finot, kiu jam verkis tiom da popolesciencaj artikoloj originalaj en Esperanto, prezentas al ni en ĉi tiu verketo facile kompreneblajn klarigojn pri la konsisto de ĉielo, pri la mirinda evoluado de la steloj kaj pri la mirindaĵoj de la vivodona suno. Ĉiu kun kreskanta intereso legos la libreton, kiu ankaŭ tre taugas por legado en kursoj kaj dum grupaj kunvenoj.

La plej bonaj spritaĵoj el «Munĥenaj flugantaj folioj». Esperanto Propaganda Instituto Leipzig, 157. 64 paĝoj. Prezo : sm. 0'600.

Ĉiusemajne mi tralegas la konatan humorajan gazeton *Fliegende Blätter* sed kelkfoje mi ne ĝuas plene la spritaĵojn, kiujn enhavas ĉar miaj konoj de la germana lingvo ne estas sufiĉaj por tio, sed nun kiam mi renkontis la samajn spritaĵojn, kaj en nia internacia lingvo, mi ne dubis eĉ unu momento, rekomendi ĉi tiun amuzan libron, kiu estas, tre bele presita, ornamo por biblioteko.

Signifo de akciaj societoj por la Esperanta movado, de A. A. Saĥarov. Moskva Librejo «Esperanto». 26, Tverskaja, Moscou. Prezo : sm. 0'05.

En ĉi tiu libreto la aŭtoro proponas la starigon de firmo por eldoni librojn, ĉu esperante, ĉu ruse.

La Popolsumigo en Aŭstrio en 1911, de Jindrich Hantich, eldonita de «Bohema Nacia Konsilantaro», en Praha. I. 331.

Ĉi tiu broŝureto estas sendata senpage al ĉiuj esperantistoj, kiuj ĝin petas al la supra adreso, kun la celo diskonigi la monstran sistemon kian uzas la aŭstria registaro por premi la Slavojn kaj forigi lian lingvon.

Vengo Vengita. Humora bilda rakonteto, verkita de Dro. A. Rudy. Raleigh, N. C. Usono. Prezo : sm. 0'25.

La bildoj enhavas la klarigojn necesajn por kompreni bone la rakonton lernante ankaŭ grandan kvanto da vortojn sen nenia peno.

Réponses a quelques objections, par M. Rollet de L'Isle. Paris. Esperantista Centra Oficejo. 51, rue de Clichy. Prezo : ne montrita.

Tre grava verketo por la esperantaj propagandistoj, kiuj trovos en ĝi bonan materialon por kontraŭstari niajn kontraŭlojn, kaj ankaŭ por tiu eltiri kelkajn notojn kiu deziras fari paroladon pri nia lingvo.

Bedaŭrinde ĝi estas eldonita franclingve kaj ne ĉiuj konas tiun lingvon.

L'Échec de la Délégation, pour l'adoption d'une langue auxiliaire internationale. Recueil de Documents. Paris. Esperantista Centra Oficejo. 51, rue de Clichy. Prezo : ne montrita.

Tiu Kajero enhavas serion de dokumentoj kaj leteroj pri la akcepto de internacia lingvo.

Elektio el «Germano Kantrezoro», de Erk Ricevebla per Esperanto Propaganda Instituto. Leipzig, 157. Prezo : sm. 1,000.

Bonan ideon havis la firmo C. F. Peters eldoninte tiun belegan libron. Ĝi enhavas la plej konatajn popolajn kantojn germanajn kun la traduko esperanta, farita per la zorgo de G. E. A. kaj provizita per notoj por kanto kun fortepiana akompano.

Ni rekomendas al ĉiuj muzikamantoj tiun ampleksan kantaron kaj gojkore salutas ĝian aperon.

Portreto gravuraĵo, de Dro. L. L. Zamenhof. ekstera grandeco 22 : 31. Ricevebla nur per la Esperanto Propaganda Instituto. Leipzig. Prezo aŭ frankite : sm. 0'850.

Arta portreto de nia Majstro, kiu tute indas troviĝi en ĉiu grupejo aŭ kunveno kiel ornamaĵo, ĉar ni kredas ke ĝis nun ĝi estas la plej vera kaj bela el ĉiuj.

Kondukanto al belega Skotlando. Higgle y K.^{nie} Printers y Publishers. Rochesay. Prezo : sd. 4.

Broŝureto, kiu priskribas morojn, tradiciojn, industrion, klimaton, k. t. p. pri la belega Skotlando. Ĝi estas uzebla por koni sufiĉe la landon de Charles Douglas, William Drummond, Robert Balfour, John Holybush kaj William Ballinden.